

NE NUR KONKURSO

① KREU NOV AJN VORTOJN

aldonante (a) unu literon en la internon aŭ

forprenante (f) unu literon el la interno aŭ

ŝanĝante (ŝ) unu literon en la interno de la donita vorto.

(Ekzemploj: *koro (a) > korbo, saŭno (f) > sano, nomo (ŝ) > noto*)

Skribu la aldonitajn, forprenitajn aŭ ŝanĝitajn literojn laŭvice en la kvadratetojn sube kaj vi ricevos proverbon el la paĝo 111 de frazeologio de Cink.

Ĉe „ŝ“-vortoj estas aldonitaj helpiloj.

1 koto (ŝ) - birdo

5 karo (ŝ) - korporgano

9 pano (a)

13 fetto (a)

2 pento (ŝ) - supro

6 kanto (f)

10 kolo (a)

14 poeto (f)

3 koalo (f)

7 duno (a)

11 forto (f)

15 planto (f)

4 mato (a)

8 kanto (f)

12 formi (ŝ) - okulon

16 kato (ŝ) - ŝlimo

1	2	3
---	---	---

4	5	6	7
---	---	---	---

8	9	10
---	---	----

11	12	13	14	15	16
----	----	----	----	----	----

②

C E R B U M U

1) En pintoj de kvar trianguloj estas numeroj. En la unuaj tri estas numeroj ankaŭ meze, sed en la kvara estas demandsignoj. Per kiu numero vi anstataŭos la demandsignojn?

8	5	6	3				
02	12	22	??				
3	9	7	9	8	8	7	4

2) Estas vico de dek numeroj. Super sep el ili estas literoj, super lastaj tri la literoj mankas. Kiujn literojn vi aldonus?

K U P K I K I

10 22 27 28 33 18 63 20 31 17

③

E S P E R A N T O – A F O R I S M O J

Laboro homigis simiojn, Zamenhof esperantistigis homojn.
Esperanto estas rimedo por ŝpari ankaŭ la tempon.
Esperantistigo estas multe pli facila afero ol esperantistado mem.
Eblas havi aŭ la monon aŭ esti esperantisto. Neniam samtempe.
La homoj venas kaj foriras, sed la lingvaj baroj restas.

A. Nikov, USSR

JA 1985/2, paĝo 14

④ LA KAMPARANO KAJ LA DIABLO

Tralaboris kaj tradukis: Sándor Termes, Hungario.

La kamparano trovis ŝtonegon sur la kampo. Nek li, nek lia ĉevalo povis formovi ĝin. La kamparano gratis sian kapon kaj ekĝemis:

„La diablo forportu ĉi tiun ŝtonegon!“

Tuj ekaperis la diablo!

„Vi vokis min kaj mi estas ĉi tie. Kion vi deziras de mi?“ La kamparano tre ektimis, sed tamen kuraĝe respondis: „Forportu ĉi tiun ŝtonegon.“

„Bone,“ murmuris la diablo, „kaj kion vi donos por mia servo?“

La ruza kamparano iomete pensis, kaj fine respondis:

„Vi rajtas ricevi de mi la rezultojn de du rikoltoj. Revenu post unu jaro, sed elektu nun, mia amiko, kion vi deziras, ĉu tion kio produktiĝas sub la kampo, ĉu tion kio produktiĝas super la kampo?“

„Mi elektas tion, kio produktiĝas super la kampo,“ ridetis la diablo, „kaj post unu jaro mi alvenos por ricevi la promesitan rikolton.“

La ruza kamparano plantis rapojn.

Post unu jaro ekaperis la diablo.

„Mi alvenis por la promesita rikolto. Kie mi trovas ĝin?“ li demandis.

„Jen la folioj de rapoj. Forportu ilin, kiel vi deziris“, flustris la hipokrita kamparano.

La diablo kolektis la foliojn de la rapoj kaj diris: „Mi denove alvenos post unu jaro por la dua rikolto. Ĉi-foje mi elektos tion, kio produktiĝas sub la kampo.“

La ruza kamparano plantis tritikon.

Post unu jaro ekaperis la diablo. „Mi alvenis por la promesita ter-produkto. Kie mi trovos ĝin?“ li demandis.

„Jen la radikoj de la tritiko. Forportu ilin, kiel vi deziris,“ ridegis la kamparano.

„Vi estas hipokrita homo,“ kriis la diablo, kaj li tuj reĵetis la ŝtonegon sur la kampon. Eĉ ne la diablo laboras senpage.

JA 1986/3, paĝoj 10-11

⑤ SOLVU LA KRUCENIGMON!


(R) = uzu nur radikon

Horizontale:

1. urba sur-rela veturilo
5. ujo simila al skatolo.
10. havi samsonajn finaĵojn. (vortoj)
11. loko, kie loĝas reĝo.
13. ripete aŭ kontstante fari ion.
14. elmeto de io, por ke ĝi estu videbla.
15. prefikso por montri moralan malbonecon.
16. citi aŭ aludi aŭ priparoli ion.
17. kvaroble kvar minus duoble sep.
18. granda voĉ-muzika verko (R)
19. subtera parto de domo (R)
20. trairejo en konstruaĵo per kiu oni povas atingi la ĉambrojn. (R)
22. birdo kun granda kolorplena vosto.
23. loko, egal-distanca inter du ekstretoj.
24. identa, nedistingebla.
25. nobela sinjorino; ankaŭ ŝaka kaj kart-luda figuro.
26. en la vico malantaŭ la dekkvina.
29. specio de bovo preskaŭ formortinta.
30. mirindaĵo, gajne kontraŭ la leĝoj de naturo. (R)
31. prefikso montranta parencecon.
32. tiu, kiu strebas superi
33. mal-jes.
34. monunuoj en Irako, Tunizio kaj aliaj landoj.
35. amfibia besto, kiu brek-brekas. (R)
36. parto de Svislando, kie oni uzas la romanĉan lingvon.
38. jubilo, hurau, feliĉu.
39. helena dio de amo kaj amoro
40. ripeta serio de eventoj.

Vertikale:

1. La movo de veturiloj (R)
2. Montri per voĉbruo subitan gajecon.
3. Senti fortan emocion al iu; kun respekto, amikemo, deziro kaj multo pli.
4. persona pronomo per kiu parolanto aludas sin mem.
5. grava, kelkfoje nekuracebla malsano (R)
6. kaŭzi, ke io ekzistu. (R)
7. mallarĝa longa formo, kutime por ŝtofo. (R)
8. ĉin-devena trinkaĵo.



9. konjunkcio uzata por esprimi komparojn.
11. komerca skriba kalkulo pri ŝuldoj aŭ bonhavo.
12. la korpa organo per kio oni vidas.
14. poste pagota servo.
16. flava legomo.
17. ne povas eviti.
18. unu parto de lakto.
19. ĝibo-hava dezerta besto. (R)
21. markonkaĵo manĝebla.
22. religia festo ĉ. tri monatojn post kristnasko.
24. serio da gradoj sisteme kaj regule aranĝitaj.
25. kaŭzi, ke io estu malcerta. (R)
26. meblo por dormi aŭ ripozi.
27. miso.
28. granda larĝa strato, kutime kun arboj ambaŭflanke.
30. eltiros mineralojn el la tero.
32. baza mangaĵo en la plimulto de Azio.
33. metala stangeto kun kapo kaj pinto por fiksi objektojn.
34. voĉe eligi vortajn komunikojn. (R)
35. granda ŝtono (R).
37. prefikso kun la signifo: denove.
38. persona pronomo por objektoj kaj bestoj.

⑥

K O N K U R S O

- 1) Faru kvar kunmetitajn vortojn el jenaj vortoj: domo, haveno, pord(eg)o, urbo, benko, libro, parko, infano.
- 2) Skribu du frazojn, en kiuj vi uzas nek nek.
- 3) Korektu la frazon: Po promeno sur parko mi volas ripozas sur tio banko.
- 4) Ŝerca demando: Kiu pano estas trinkebla?
- 5) Mallongigu per -ig aŭ iĝ: meti sur muron, en pogon: fali en dormon.
- 6) Kompletigu la proverbojn: Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion ...; Sen laboro ne venas ...; Kun kiu vi festas, tia vi ...
- 7) Persona pronomo + persona pronomo = verbo
- 8) Nomu ses aĵojn/ilojn, kiujn oni bezonas por kuiri aŭ manĝi.
- 9) Ĉu marabuo estas afrika birdo, ĉemara arbo aŭ japana muzikilo?
- 10) Mia onklo Longbarbul rakontis: Kiam mi estis maristo ekzistis ankoraŭ piratoj. Ili havis sur la ŝipo papagojn, kiujn ili sendis al fremdaj ŝipoj por spionakiri informojn. Reveninte la papagoj raportis. Ĉu vero aŭ ne?

JA 2001/1, paĝo 25

⑦

H U M U R A R A K O N T O

Nokte oni vokis kurac'iston al riĉa paciento, kiu plendis pri siaj doloroj imag'itaj:

– Ho, doktoro, mi certe mortos.

La kuracisto ekzamenis lin, sed ne trovis lin mal-sana.

– Ĉu vi jam pret'igis vian testamenton? – demandis la kuracisto.


– Ne, ĉu mi... – pal'igis la paciento.

– Bon'volu tuj al-voki viajn advokaton, filojn kaj bo-filinojn –, respondis la kuracisto.

La paciento obeis kaj, poste, ĝem'ante, demandis al la kuracisto:

– Ĉu mi mortos nun?

– Ne, vi estas tute sana, sed mi ne volis esti la sola stult'ulo, kiun oni vane vekis nokto-meze kaj ven'igis sen-bezone al via domo –, respondis la kolera kuracisto.



Raita Pyhälä